



INTER NI

estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 205

Majo 2003

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto
Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto
Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15

★ ★

FELIĈAN DATREVENON AL NI

Ĉi-monate komenciĝas por *Inter Ni* la 18-a eldon-jaro. Post 17 sinsekvaj jaroj (t.e. 204 ĉiu-monataj numeroj) la gazeteto ŝajne iom post iom maturiĝis, tamen restas espereble sprita, tute neformala, kaj eĉ agrable nekutima. Oni esperas ke, kiel ĉiu 17-jarulo, ĝi povos rapide kaj sukcese eliri en la mondon, sed samtempe ĝi kaŝe esperas povi iom pli eksperimenti pri novaj se ne tro danĝeraj aferoj.

Ĉi-monate NI prunteprenas artikolojn jam plifruere rekomenditajn el du aliaj gazetoj: *BAZARO* kaj *NASKa Fasko*. Ni multe dankas al la kontribuintoj.

Se vi havas bonan konsilon por oferti al la preskaŭ plenaĝulo – la preskaŭ sed ankoraŭ ne 18-jarulo – bonvolu fari tion. Feliĉan datrevenon al NI.

— via redaktoro



LA SUPŜTONO

(popolfabelo)

En eta vilaĝo ĉe iu malriĉa dometo frapis la pordon fremdulo. Li petis iun manĝaĵon de la dommastrino, sed ŝi kun bedaŭro diris, ke ŝi havas nenion hejme.

„Ne gravas,” diris la fremdulo, „mi havas ‘supŝtonon’ en mia sako. Se vi permesus, mi metos ĝin en poton kaj mi preparos bongustan supon.”

La virino iĝis ege scivolema. Ŝi plenigis per freŝa akvo kaj metis sur la fajron grandan poton kaj al la najbarino flustris pri la sekreto de la supŝtono. Kiam la akvo ekbolis, ĉiuj najbarinoj estis jam en la kuirejo. La fremdulo metis la ŝtonon en la bolantan akvon, poste li gustumis la 'supon' per kulereto kaj diris:

„Mirakle bona ĝi estas! Nur iom da terpomo mankas el ĝi.”

„Mi havas kelkajn terpomojn” ekkriis najbarino. Post minutoj ŝi jam alportis la senŝeligitajn kaj pecigitajn terpomojn, kiujn li tuj ĵetis en la poton. La fremdulo denove gustumis la supon.

„Sensacia ĝi estas!” Poste sopire li diris, „Se nur iom da viando estus en ĝi, tiam ĝi iĝus eĉ pli bongusta!”

Alia najbarino kuris hejmen kaj alportis viandopecon kaj enmetis ĝin en la poton.

Post iom da tempo la fremdulo denove gustumis la supon; al la ĉielo rigardante li diris, „Majesta ĝi estas! Nur iom da legomoj mankas, por ke ĝi estu perfekta!”

Alia najbaro rapidis hejmen kaj alportis korbون plenan da karotoj kaj cepoj. Kiam ĉio kunboliĝis, la fremdulo post la sugustumo ordone diris al la dommastrino, „Salon kaj kondimentojn!”

„Jen, ĉi tie ili estas,” diris la virino serveme.

Ĉiuj hejmeniris kaj alportis telerojn kaj kulerojn. Kelkaj el ili alportis panon kaj diversajn fruktojn. La fremdulo plenigis ĉies teleron per la supo kaj ĉiuj ekmanĝis. Strange, ili ĉiuj sentis ian apartan feliĉon, dum ili sidante kaj babilante manĝadis la unuan komune kaj kune preparitan manĝaĵon.

Poste, la fremdulo forlasis ilin en gajeco, sed lasis por ili la miraklan supŝtonon, por ke ili ankaŭ alfoje povu uzi ĝin, se ili deziras manĝi la plej bonan supon de la mondo.



— Esperantigis Júlia 'SIGMOND. Aperis en BAZARO: Esperantlingva revuo, Kluĝo, Rumanio (Printempo, 2003). Multan dankon al Júlia pro ŝia sugesto eldoni ĉi tiun fabelon. Ĉu vi jam konas ĝin?

KIEL MI KURSANIS KAJ POSTE ELDONIGIS MIAJN HEJMTASKOJN

(verkis Steĉjo kiel hejmtasko ĉe la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto)

La nomo de nia instruisto estis Jovan Zarkoviĉ. Mi bone memoras ke li estis jugoslavo sed ne memoras ĉu serbo, kroato, sloveno, eĉ bosniano. En tiu epoko, la fruaj naŭdekaj jaroj, ne multe gravis. Li instruis ĉe la Nord-Amerika Somera Kursaro en San-francisko kaj, laŭ mia posttakso, influis min multe pli ol mi tiam suspektis. Li estis la tradukinto de sciencfikcia libro “*O*” kaj *aliaj rakontoj*, far Damir Mikuliĉiĉ, kiun mi rekomendas.

Li bone instruis nin per ekzemploj el la literaturo, ke en nia lingvo ekzistas mallongaj radikoj kiuj povas esti aparte utilaj por vortkombinado.

Iun tagon li prelegis al la klaso pri stilo en verkado. La hejmtasko estis: “Verku laŭ du stiloj la saman artikolon aŭ eseon”. Jen la defio. Feliĉe mi mem rajtis elekti la temon. Oni ofte konsilas al verkontoj, “skribu pri tio kion vi konas ĝisfunde”. Mi estis ĥirurgo kaj mia precipa profesia intereso estis melanomo, la plej mortiga el la haŭtkanceraj. Do, mi verkis artikolon pri melanomo por ĝeneralaj kuracistoj. Mi jam kelkfoje verkis similajn artikolojn en la angla, kaj pro tio la ĉefa defio al mi estis serĉi en la Esperanta vortaro por trovi la bezonatan vortstokon. Kiam mi estis kontenta pri la profesia artikolo, mi strebis evoluigi akordan artikolon por la laikaro. La dua artikolo enhavis similan informon, iom plisimpligitan. Feliĉe por mia celo, oni povas krei Esperantajn vortojn kiuj estas priskribaj kaj tiel anstataŭigi multajn teĥnikajn terminojn per klarigaj vortoj. Mi verkis kaj reverkis ambaŭ artikolojn ĝis mi taksis ilin sufiĉe kontentigaj.

Kelkajn tagojn post la submeto al la instruisto, li redonis. Estis abundo da ruĝaj markoj kaj komentarioj, sed fundamente li ŝatis mian laboron kaj tion diris al mi. Mi studis la erarojn kaj atente tralegis la komentariojn. Tamen, hejmtaskaĵo plenplena je ruĝaj markoj estis al mi iom hontiga. Precipe pro tio mi reverkis la du artikolojn. Nun mi estis fiera posedanto de du artikoloj seneraraj.

Mi ne estas homo kiu pensas fulmrapide. Nur iom post iom la ideo venis al mi, ke eble la artikoloj, jam seneraraj kaj plenplenaj de bonaj informoj, povus esti re-verkitaj ĝis eldonebleco. Dum tuta jaro mi de tempo al tempo reviziis, plibonigis kaj poluris. Mi eĉ sendis la artikolojn al eksterlandaj esperantistoj, kiuj ne parolas la anglan, por havi internaciajn kritikojn.

Finfine mi sendis la artikolon por kuracistoj al la *Medicina Internacia Revuo* kaj tiun por la laikaro al *Monato* kaj maltrankvile atendadis. Mi sentis grandan malŝarĝon kiam ambaŭ estis akceptitaj.

En la sekvantaj jaroj mi jen kaj jen faris simile. Mi neniam refoje kreis du eldon-eblajn artikolojn en la sama somera kursaro kaj kelkare mi eĉ kreis nenion por eldoni. Tamen, inter la eldonitaj verkoj estas eseo pri eternaj komencantoj, matematika artikolo pri la geometrio de pentagramo, ŝerc-eseo pri reformado de Esperanto, fantazia rakonto pri la deveno de la dek ses reguloj, ĉiu naskita (almenaŭ koncipita) ĉe unu el la Nord-Amerikaj Someraj Kursaroj de Esperanto.

Do, la mesaĝo estas klara: Nepre faru viajn hejmtaskojn! — kaj poste eldonigu ilin.

— Verkis Steĉjo Norvell. Aperis en NASKa Fasko, La taga ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK), Brattleboro, Vermonto, redaktis Lee (Liĉjo) Miller (Lundon, 15 julio 2002)

MILITO

**Jen soldato, kiu transvivis venkon
kaj marŝas laŭdante tiujn,
kiuj mortis ne vane.**

**Jen soldato, kiu transvivis malvenkon
kaj bruladon de kampoj kaj hejmoj.
Li konstruas monumentojn en sia koro
al la herooj, kiuj mortis ne vane.**

**Jen patrino, entombigante filon,
longtempe antaŭ la militperdo.
Ŝi skribas en la Biblio apud lia nomo:
“Soldato. Li mortis ne vane.”**

**Jen infano, kiu vagas
sencele laŭ la stratoj
kaj ploras por patro,
kiu mortis ne vane.**

**Jen viro, virino kaj infano,
ankoraŭ provante verki packanton,
kiu ne mortos vane.**

— Verkis Don Houpe. Aperis en NASKa Fasko: La taga ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK), Brattleboro, Vermonto (Mardon, 23 julio 2002)